

# TEA-BULTENO

21$^{A}$ JARO - N° 142 — MARTO - APRILO — N. 3-4/2018

La destino de popolo dependas de la kondiĉoj de ĝia gramatiko. Ne ekzistas granda lando sen parolprecizeco. *Fernando Pessoa, portugala literaturisto (1888 - 1935)*

## Jara Asembleo de TEA dimanĉon la 18$^{an}$ de februaro 2018

### *Raporto de la prezidanto*

Estimataj Asocianoj, karaj Geamikoj,

Bonvenon al tiu ĉi nia jara asembleo dum kiu ni klopodos eltiri la konkludojn de la asocia agado por 2017.

Tiu ĉi 2017$^{a}$ estis jaro de novaj spertoj kaj de novaj esperoj, kies fruktojn ni povus rikolti en la nuna jaro. La projekto pri Seminario, realigita pasintoktobre, kiu pritraktis la Internacian Komunikadon, tre bone funkciis kaj sukcesis. Partoprenis entute 28 personoj, bona nombro, kvankam ne ĉiuj ĉeestis ĉiam. Fakte pluraj venis akurate kaj foriris iom pli frue, aliaj venis malpli akurate sed restis ĝis la fino; kelkaj venis al iuj lecionoj kaj al iuj aliaj ne…. Estis iom da "movado" dum la lecionoj!

Malgraŭ tio, mi konsideras la aferon tre sukcesa, ĉar la interesiĝo pri la temoj estis granda: kiuj sciis nenion pri Esperanto, estis surprizitaj pri tio kion ili aŭdis, pri la personoj kiuj gvidis la seminarion, kaj ĉio ĉi entute vekis entuziasmon. Danke al tio, ekde 2018 ni havas tri pliajn membrojn: Stefano MARZI DONAGGIO (kiu praktike eĉ ne unu vorton en Esperanto konas, sed entuziasmiĝis pri la ideo, filozofio kaj historio), Peter GRBEC (kiu bone konas la lingvon) kaj Rožana ŠPEH (kiu ne ĝin bone konas, sed nepre deziras ĝin ellerni). La lastaj du loĝas apud Koper kaj tie laboras kaj agas. Peter kaj Rožana vizitas nian nunan mardan unuagradan kurson, malgraŭ ke la unua ne bezonus, sed la dua ege volas spertiĝi pri Esperanto.

En la nuna kurso komenciĝinta januare, partoprenas ankaŭ du junaj novuloj, kiujn mi varme esperas kalkuli baldaŭ kiel novajn membrojn.

Mi devas mencii ke ekde pluraj monatoj ni estas tre aktivaj en la Interreta mondo: danke al Mirko Nikodimovich, asociano ekde 2017, tre kapabla kaj fantaziema en tiu fako, nia reta paĝo plibeliĝis, moderniĝis kaj aktualiĝadas konstante kaj ofte. Ankaŭ nia paĝo en Vizaĝlibro (*Facebook*) komplete aliiĝis: tute moderna, juna kaj freŝaspekta, prezentanta multajn informojn pri nia asocio, pri Esperanto ĝenerale kaj pri pluraj diversaj agadoj.

Jam dum la pasintaj ĝeneralaj asembleoj mi havis la okazon paroli pri la eblecoj kiuj de tempo al tempo prezentiĝas al nia Asocio por agadi kunlabore kun aliaj societoj aŭ personoj. Bedaŭrinde malofte ni profitas de tio, sed kion fari? Niaj fortoj estas limigitaj kaj la vivo fariĝas ĉiam pli komplika.

Mi plue informas, ke en 2017 ni fariĝis partnero de "Amikoj de la muzikema triesta junularo", kun kiu ni jam antaŭ kelkaj jaroj kunlaboris pozitive, por la projekto "7 notoj por la paco", ricevinta monkontribuon de nia Regiono kadre de subtenado al volontulaj asocioj. Sekve de tio kaj kune ni prizorgos realigon de evento dediĉita al la Tago de la Patrina Lingvo, sabaton la 24$^{an}$ de februaro je la h. 17.30. Temas pri la koncerto "*Cantiamo le nostre lingue*" (Ni kantu niajn lingvojn), kun ĉeesto de kvin korusoj, kiuj prezentos popolajn kantojn en triesta dialekto, slovene, greke, serbe; plus Kultura Asocio Schiller, kiu ĝuigos la publikon per akordiona muziko kaj legado de poeziaĵo de Friedrich Schiller; sekvos hungara sinjorino, legonta poeziaĵon pri Danubo en sia lingvo. Mi aldonu, ke la koruso el *Servola* kantos, krom slovene, ankaŭ en Esperanto.

Sed ni revenu al la jaro 2017.

Vizito de niaj kunvenoj estas ege utilaj por la asocia vivo, por flegi kontaktojn, por interŝanĝo de ideoj kaj preparo de projektoj, kaj absolute necesaj por lingva ekzercado. Sed mi devas konfesi, ke la situacio ne estas entuziasmiga. Dum niaj vendredaj kunvenoj malfacile ĉeestas pli ol 5–6 personoj, kaj sekve ni preskaŭ nuligis la mardajn renkontiĝojn. Interparenteze, nun la mardoj estas dediĉataj al la lecionoj de la baza kurso.



Dum tiu ĉi jaro tri gejunuloj partoprenis la bazan kurson: ili estis lertaj kun granda intereso pri la lingvo kaj ties celoj. Unu, Mirko, kiu loĝas kaj laboras en Triesto, fariĝis TEA-ano, sed la aliaj du... ĝis nun ne: ili estas studentoj tamen loĝantaj en aliaj urboj, do ni esperu, ke ili restu iamaniere en la movado kaj ligataj al nia lingvo.

Spite de ĉio, ni ricevis la inviton fare de la Itala Esperanto-Federacio organizi en Triesto la italan kongreson de Esperanto en la venonta jaro (2019). Mi jam komencis esplori la eblecojn kaj kiajn subtenojn ni povus ricevi. Ankaŭ tio povus helpi nian Asocion plurmaniere... Sed pri tio ni parolos poste.

Kaj mi tuŝu ankoraŭfoje tiklan temon: tiu ĉi estas la 112ª jaro de la fondiĝo de TEA. Kiom longe ĝi ankoraŭ povos agadi? Demando al kiu respondi malfacilas.

Niaj homfortoj estas limigitaj kaj financaj rimedoj reduktiĝas konstante, tiom ke prognozi nian estontecon estas malfacile. TEA bezonas helpon konkretan kaj ĉiuspecan, precipe en eŭroj.

Mi finas la raporton, verdire iom pli longa ol la pasintaj, per la varma invito subteni nian Asocion. Se tiu ĉi mankos, nenio kontraŭstaros la malaperon de grupo – se paroli malmodeste – unu el la plej pozitive agemaj, kreita antaŭ pli ol unu jarcento. Mi konfesas al vi, ke tiu okazaĵo estus vera katastrofo, kiun neniam mi volus travivi.

Vivu TEA kaj Esperanto!

*Edvige Tantin Ackermann*

---

## *Agadaporto de la sekretario*

Tre estimataj
kaj karaj TEA-anoj!

Ni kunvenas en tiu ĉi tago, por kune pritrakti la pasintjarajn okazintaĵojn, realigitaj de TEA, aŭ kune kun aliaj organizoj.

**Februare (14ª):** Okazis, en la mezgrada lernejo *Francesco Rismondo*, renkontiĝo kun la lernantoj partoprenintaj en la 3ª Pentrokonkurso *Angelo Soranzo*. En tiu tago estis prezentitaj Esperanto kaj la agado de TEA.

**Aprile (22-23-aj):** Partopreno en la 19ª Alp-Adria Konferenco okazinta en Brežice (SLO). La ĝenerala sekretario de AA-Konferencoj, Edvige Ackermann, priparolis la situacion de ĉi organizo, dum Elda Doerfler, helpe de bildoj, prelegis pri la "Lastaj tagoj de d-ro Ludoviko Zamenhof".

**Septembre (28-30-aj):** Okaze de la 110ª fondodatreveno de la E-societo de Rijeka, TEA-anoj estis invititaj kontribui en la programo per prezento de la ekspozicio Esperanto kaj Filatelo, kiu estis muntita en la ejoj de *Circolo di Cultura Italiano (*Italkultura Klubo), urbocentre.

**Oktobre (13-14; 20-21; 24-27):** Subvenciita de la Centro pri Volontula Servado FVG okazis "Seminario pri internacia komunikado", kies celo estis alfronti la problemon de la internacia komunikado: oni startis per prezentado de la aktuala situacio kaj de la diversaj provoj solvi ĉi problemon, ĝis alveni al la lingva projekto de Ludoviko Lazaro Zamenhof. Krom la elstaraj prelegoj de profesoro Davide Astori, el Universitato de Parma, okazis ankaŭ leciono fare de Manuela Oliva pri la diversaj teknikoj por plibonigi la lernado-sistemon, plifaciligi la enmemorigon kaj rapidan legadon, precipe rilate al studado de aliaj lingvoj. Grupo de junaj torinanoj per rapida kurso klarigis koncize la strukturon de Esperanto. La tuto glate kaj sukcese disvolviĝis kaj vidis la ĉeeston de ĉ. dudeko da personoj.

**Oktobre (24ª):** Post la apero de la petskribo por savi la Tramon de *Opcina*, estis sendita alvoko perreta al pluraj esperantistoj, por ke ankaŭ ili, precipe tiuj kiuj spertis la supreniradon al altebenaĵo karsta pere de ĝi, subskribu por kontraŭstari ĝian forigon. Pluraj plenumis nian peton.

**Oktobre (15ª):** Ni ricevis de la Fondaĵo Biblioteko Apogo Bachrich – UEA - la sumon de 133,78 € por aĉeto de E-libroj. Entute alvenis dek libroj, preskaŭ ĉiuj plej laste eldonitaj. Nia biblioteko pli kaj pli riĉiĝas per gravaj verkoj: ili staras sur la bretoj atendante legantojn.

**Novembre (12-15-aj):** Ankaŭ en 2017 Marija Belošević organizis tre interesan Seminarion, en kiu partoprenis Edvige Ackermann. La programo, tre densa, inkluzivis tre interesajn vizitojn de monumentoj, preĝejoj kaj muzeo, koncertojn kaj renkontiĝojn kun gravaj personoj, okupiĝantaj pri la kroata kulturo. Okazis en urbocentra biblioteko la memorigo pri Lucija Borčić. Vere ekzemplodona aranĝo.

**Decembro (10ª):** En gaja etoso kaj ĉeeste de pluraj gastoj, oni festis en Triesto la naskiĝdatrevenon de nia Majstro. Estis prezentita interalie, serio da fotoj novaj kaj malnovaj, titolita: "Spuroj de Ludoviko Zamenhof en nuna Bjalistoko".

**Decembro (11ª):** Enkadre de la Projekto "Mia Lernejo kaj la Volontulado", celanta eduki la novajn generaciojn kompreni la bazajn sociajn valorojn, kiaj estas la solidareco, altruismo kaj vivrespondeco, kaj organize de la Asocio *Anteas* pri civila volontulado, ni prezentis Esperanton kaj nian asocion al ĉ. 50 lernantoj el la Instituto por Enkonduko en laborkampon (*avviamento al lavoro*) – 'Lernejo IAL'.

**Decembre:** Aperis la disko KANZONOJ KAJ KANTOJ KRISTNASKAJ, per kiu aŭskulteblas korusoj diversnaciaj kanti en pluraj lingvoj, inkluzive de Esperanto. Temis pri projekto de Pier Paolo Sancin: la rezulto de la vendo de la dis-koj estis destinita al Burlo.

**Pri vizitoj:** Maje (27[a]), kiel jam tradicie, ni vizitis, kune kun la geamikoj el Rijeka, la vidvinon de la kara Marĉelo Trampuh en Kaštelir; junie (17[a]), esperantistoj el Rijeka kaj Triesto renkontiĝis kun Zlata Petroviĉ.

Somere, multnombraj, ni ĉeestis feston ĉe Anita.

Al la asocio, en 2017, aliĝis du novaj membroj: Peter Grbec kaj Stefano Marzi Donaggio.

**Esperantistaj gastoj en Triesto**: dum la jaro vizitis nin Elda kaj Alessandro Corrado el Brescia, kaj Peter Grbec el Koper kun franca familio.

**Pri kongresoj/konferencoj:** Julie, UK en Seulo: partoprenis nur Edvige; aprile, 19[a] Alp-Adria Konferenco en Brežice: Cristiana, Edvige kaj Elda; aŭguste/septembre, la 84[a] Itala Kongreso en Policoro: ĉeestis Barbara, Edvige, Elda kaj Margherita.

Septembre, forfalis la Festo de Amikeco sur la Trilanda Pinto, pro veteraĉo.

**Pri ekstera informado:**

Kiel kutime **anoncoj/informoj** pri kursoj, programoj, aranĝoj en Triesto kaj aliloke estis senditaj dum la jaro al lokaj radioj, ĵurnaloj, sed precipe perrete.

Danke al engaĝiĝo de nia asociano Mirko Nikodimovich, TEA havas novan retejon, tre belaspektan, precipe junstilan kaj modernan. Pro lia konstanta engaĝiĝo eblas finfine tie legi ĝisdatitajn informojn pri nia kaj monda agado; plie en tiu ejo riceveblas informoj plej diversaj, precipe pri kio okazas en Esperantujo.

Konsilindas ĝin viziti ĉe:

www.esperantotrieste.altervista.org

Por la revuo INSIEME VOLONTARIAMENTE, eldonita de la Centro pri volontula servado (CSV FVG) kaj aperanta ĉiun trian monaton (kvarfoje jare), Edvige zorgas pri la rubriko ESPERANTO.

**Alirprogramoj de Radio Uno**: daŭras la ĉeesto de TEA en la aliprogramoj de RAI. Dum la jaro okazis entute 10 elsendoj pri diversaj temoj: por ilin aŭskulti, ĉiam troviĝas informoj en la bulteno.

**Ĝeneralaj informoj:**

**TEA-Bulteno**: senhalte la ses-paĝa asocia informilo aperas ĉiun duan monaton. Ĝi estas dissendata al ĉiuj membroj de TEA, ĉu paperversie, ĉu rete, kaj ankaŭ al pluraj esperantistoj/grupoj tra la mondo.

**Estrarkunsidoj**: dum la jaro oni kunsidis kvar-foje.

**Korespondado**: en papera versio estis ricevitaj/senditaj kelkdeko da leteroj; retaj mesaĝoj senditaj/ricevitaj estis pli ol cent: tiuj troviĝas en kompakta disko en la koncerna ujo pri „Korespondado 2017 ".

Fine de tiu ĉi raporto, mi dankas vin pro la atento. *Elda Doerfler*

# Kio novas en Esperantujo?

Antaŭ dek unu jaroj, en januaro 2007 komencis aperi la elektronika versio de la LA ONDO DE ESPERANTO. La redakcio post paso de kvin jaroj senpage disponebligas malnovajn jarkolektojn. Ĵus estis enretigitaj la pdf-versioj de ĉiuj numeroj de la 2012[a] jaro. Krom pli ol du centoj da primovadaj artikoloj, kiuj perdis sian aktualecon, en ĉi tiu jarkolekto aperis pluraj daŭre interesaj artikoloj pri diversaj temoj, multaj recenzoj, originalaj kaj tradukitaj beletraĵoj kaj dekartikola ciklo pri Esperanto-poetoj, de Zamenhof ĝis Mao Zifu, en la rubriko "Nia trezoro".

Nun ses jarkolektoj de "La Ondo" (2007, 2008, 2009, 2010, 2011, 2012) estas libere elŝuteblaj ĉe http://esperanto-ondo.ru/Lode-old.htm

En la sama retejo estas ankaŭ ligiloj al la demonstraj versioj de ĉiuj pasintjaraj "Ondoj".

LA ONDO DE ESPERANTO (11 numeroj laŭ "pdf" kaj "ePub" + literatura suplemento), estas abonebla por la tuta jaro 2018 kontraŭ nur 15 eŭroj ĉe niaj perantoj, UEA-konto, kaj per PayPal/bankkartoj ĉe http://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm

# Printempa Seminario 28/04 - 1/05 2018 Marina di Pietrasanta

Foje prezentiĝas ŝanco enkonduki Esperanton en lernejojn, sed ofte manko de sperto kaj materialoj ne permesas trafi tiujn gravajn okazojn adekvate.

Tial, organize de la Eduka Komisiono de la Itala Esperanto-Federacio, dum la seminario oni proponos solvojn por alfronti tian situacion.


La temo estos: MALLONGE ENKONDUKI ESPERANTON EN LERNEJOJN, kaj la tri ĉefaj fokusoj estos la analizo de UNU LECIONO PRI ESPERANTO de ILEI; enkonduka kurseto Lu Wunsch-Rolshoven kaj reellaborado de la Torina kurso de Pedro Aguilar Sola.

Varme vin invitas lerni kaj ĝui kune, la Eduka Komisiono de IEF. Fakte, ne nur studado sed ankaŭ muzik-vesperoj kaj ekskurso!

Prezo por la 3 tagoj 230 € (kurso, loĝado kaj manĝoj inkluzivitaj).

Por aliĝi bonvolu uzi la aliĝilon ĉe www.lingvaseminario.it aŭ sendi retmesaĝon al: laura.brazzabeni@alice.it

## *Antaŭ 111 jaroj estis eldonita la "Hispana Esperantisto"*


I Jaro. I Num. 1917 Januaro.—Madrido

HISPANA ESPERANTISTO

ILUSTRITA REVUO MONATA.—OFICIALA ORGANO DE «ZAMENHOFA FEDERACIO»

Niaj unuaj vortoj

En fatalaj tempoj por la Homaro aperas Hispana Esperantisto, tamen, post nia tutkora saluto por la Esperantistaro, estu nia unua deziro tiu de Proksima Paco.

L. L. Zamenhof

Niaj unuaj vortoj

En fatalaj tempoj por la Homaro aperas Hispana Esperantisto, tamen post nia tutkora saluto por la Esperantistaro, estu nia unua deziro tiu de Proksima Paco.

Je la fino de la dua numero, februare 1917, troviĝas tre bela poŝtkarto, kiun unuafoje mi vidis. Tiam ĝi estis aĉetebla ĉe la redakcio de la ĵurnalo. Por Esperantaĵ-kolektantoj tiu ĉi karto estas vera raraĵo. Kiu el vi ĝin posedas? Mi estas scivolema kaj ŝatus ĝin vidi - se ĝi ekzistas - kolore!




En LA LAMPIRO, N° 4, jaro 2016, organo de Esperanto-Asocio de San-Paŭlo, James Rezende Piton tiel skribis pri ĝi:

"Sur hispana poŝtkarto el 1912 oni vidas bildon de malnova presilo kaj plurajn literaturajn aludojn, kun speciala atento al Don-Kiĥoto de la Manĉo, lia ŝildisto Sanĉo Panzo kaj ventmuelilo. Ĉiuj sub radianta stelo kaj la titolo: "Unuiĝo de Esperanto kaj Presarto estas la plej granda monumento de l' Homaro": "Homaro" cetere estis madrida monata revuo, kiu tiun karton eldonis."

Se vi deziras legi kelkajn numerojn de "Hispana Esperantisto", faru virtualan viziton al la arkivoj de la Esperanto-Muzeo en Vieno ĉe jena ttt-ejo:http://anno.onb.ac.at/cgi-content/anno-plus?aid=e2o

## Aŭskultu tiun ĉi konsilon, tute senpagan!

*Rapide manĝi pliigas la riskon de metabola sindromo kaj obezeco – tia la rezulto de kvinjara studado ĉe la Universitato de Hiroshima*.

Malrapide manĝi reduktas la eblon iĝi obezaj aŭ trafitaj de tiu sindromo. Fakte rapidmanĝado provokas ŝanĝiĝojn de la sukeraj niveloj en la sango, kio povus kaŭzi insulino-kontraŭstaron aŭ –rezistadon: tio kondukas al serio da perturboj kiuj multobligas la riskon de kormalsanoj, diabeto kaj ikto (*cerba infarkto)*.

Tio ĉi estas la rezulto de japanaj esploristoj en *Hiroshima*, kiuj testis 642 virojn kaj 441 inojn, mezaĝajn (51-jarajn). En neniu evidentiĝis antaŭe ia ajn signo de metabola sindromo, kiam ili estis alprenitaj por la esplorado en la 2008[a] jaro. La partoprenintoj estis sekvataj dum kvin jaroj kaj estis disdividitaj en tri kategoriojn, laŭ propra manĝadkutimo: rapida, normala, malrapida.

Dum tiuj kvin jaroj, la procentaĵo de metabola sindromo, inter kiuj rapide manĝas, egalis al 11,6%, dum inter kiuj per normala rapideco manĝas estis de 6,5% kaj 2,3% inter tiuj malrapide nutriĝantaj.

La esplorado, aperinta en la revuo *Circulation*, de la Amerika Asocio pri Kormalsanoj (*American Heart Association)* pruvas ankaŭ, ke rapida manĝado ligiĝas al korpa pezaltiĝo, plilarĝigado de la ventro kaj pliiĝo de la sanga glukozo. Ĉio ĉi ĉar, se oni manĝas malrapide kaj pli ol kutime maĉadas, la cerbo ricevas signalojn de satiĝo kaj sekve pli probablas, ke oni ĉesigas pli frue la manĝadon, kompare kun tiu kiu tion faras rapide.

Manĝi ne nur estas devo por resti vivanta kaj kiel eble plej forta kaj sana: ĝi estas ankaŭ plezuro por la korpo kaj spirito, tial malrapida manĝado donas ĉiusence kontentigan senton.

*Tradukis kaj kunmetis ElDo*
El www.ilfattoalimentare.it il fatto alimentare

## Aforismoj

Miaopinie, mortigi iun ajn vivantaĵon, iel estas kiel mortigi sin mem, kaj mi ne vidas diferencojn inter la doloro de besto kaj tiu de homa estaĵo.

*Margherita Hack (1922-2013)*

Se vi deziras lerni, instruu.

*Cicerone (Marcus Tullius Cicero) (106- 3 aK)*

**BULTENO de TRIESTA ESPERANTO-ASOCIO**
**Redaktanto**: Elda DOERFLER - testudo.ts@gmail.com
**Sidejo/Poŝta adreso**: Via del Coroneo 15 - IT-34133 Trieste
**Kunventagoj:** marde 18-20; vendrede 19-21
**Tel**: (+39) 392 2860685 - 040 350093; 339 2226936
**Banka Konto**: Unicredit - IBAN IT 53 U 02008 02242 000102990439
**Reto**: esperantotrieste@yahoo.it; nored@tiscali.it
**Asociaj ttt-ejoj:** www.esperantotrieste.altervista.org; www.tea1906.altervista.org; www.karstajtagoj.altervista.org



## *Ekskurso al antikva lago Ĥuvsgul, Mongolio*

Mongola Esperanto-Societo kaj mongola turisma kompanio "I nomadic" invitas vin al ekskurso en Ulanbatoro kaj Nacia Parko de Ĥuvsgul.

**Dato**: de la 18ª ĝis la 25 ª de junio 2018.

Bonvenon al esperantistaj kaj neesperantistaj grupoj kaj unuopuloj!

Eta priskribo de la ekskursa programo:

**1ª tago:** alveno, enhoteliĝo, prezentado de la itinero, interkona vespero kaj vespermanĝo.

**2ª tago:** vizito de la Gandan-templo budhisma kaj ekveturo al la lago Ĥuvsgul.

**3ª tago:** veturo al kampadejo ĉe la lago, enloĝigo en la Gero, mongola tradicia loĝejo; piedmarŝo ĉe la lago kaj al la Ovoo, sankta ŝamanisma loko ĉe la pinto de monteto. En la kampadejo diversaj aktivaĵoj.

**4ª tago:** veturo al boac-bredanta tendaro ĉe rivero Buga. Dum la restado en la kampadejo oni konatiĝos kun la kulturo, ĉiutaga vivmaniero kaj bredado de la boacistoj, kaj ankaŭ spertos la ŝamanisman kulton.

**5ª tago:** reveno al Ulanbatoro; enloĝiĝo en survoja kampadejo.

**6ª tago:** alveno en Ulabatoro; vizito de la urbo kaj rigardo de la alto; koncerto de Nacia Ensemblo de Popola Folkloro.

**7ª tago:** vizito de la granda statuo de Ĉingis-Ĥano kaj de la muzeo pri li; vizito de folklora vilaĝeto k.a.


**8ª tago:** veturo al flughaveno aŭ trajnstacio.

**Kotizo**: 856 eŭroj. Ĝi inkluzivas 2-litan hotelon en Ulanbatoro, 2-litan gastejon en kampadejo, tri manĝojn ĉiutage, enirbiletojn, enurban kaj kamparan transportadon. Antaŭ via vojaĝo, bonvolu mem aranĝi vian asekuron.

**Aliĝoj** kaj demandoj al Mongola Esperanto-Societo: mn_esperanto@yahoo.com

Pliajn detalojn vi trovos ĉe la jena ttt-ejo:
http://ekskursoj.blogspot.it/2017/11/ekskurso-tra-ulanbatoro-kaj-la-antikva.html

Konsilo de Elda: En 2010 mi havis la mirindan okazon ĉeesti la 6an Azian E-Kongreson, okazintan junie en Ulanbatoro. Belegaj ekskursoj estis faritaj tra la lando, al kiu mi varme esperas iam reveni! Mi pasigis en Mongolio semajnojn tute neforgeseblajn, danke precipe al la esperantistaj akompanantoj. Ne perdu ĉi tiun ŝancon: spertu la bluon de la ĉielo, la orflavan koloron de la dezertoj, la firmajn rokojn arte prilaboritajn de la ventoj, la senfinan spacon de la prerioj kaj la ĉarman karakteron de la mongoloj.



## Marta Programo

| | |
|---|---|
| 2a, vendredo | 20h00 - Diversaĵoj pri ĝenerala agado |
| 6a, mardo | 18h00 - Kurso de esperanto |
| 9a, vendredo | 20h00 - Vespero kun Michela Lipari, Prezidanto de Itala E-Federacio |
| 13a, mardo | Ne okazos la kurso de esperanto |
| 16a, vendredo | 20h00 - Kuna legado de SOVAĜA ĈEVALO, kroata infanliteraturaĵo |
| 20a, mardo | 18h00 - Kurso de esperanto |
| 23a, vendredo | 20h00 - Bildoj el 2007 - Japanio |
| 27a, mardo | 18h00 - Kurso de esperanto |
| 30a, vendredo | 20h00 - Pri venontaj eventoj |

## Aprila Programo

| | |
|---|---|
| 3a, mardo | 18h00 - Kurso de esperanto |
| 6a, vendredo | 20h00 - Kuna legado de SOVAĜA ĈEVALO, kroata infanliteraturaĵo |
| 10a, mardo | 18h00 - Kurso de esperanto |
| 13a, vendredo | 20h00 - Rememoroj pri Bazilikato |
| 17a, mardo | 18h00 - Kurso de esperanto |
| 20a, vendredo | 20h00 - Legado de la "Historio de la Esperanta Literaturo" |
| 24a, mardo | 18h00 - Kurso de esperanto |
| 27a, vendredo | 20h00 - Pri venontaj eventoj |

## La 20ª Konferenco de Alp-Adriaj Esperantistoj okazos de la 8ª ĝis la 10ª de junio 2018 en Bjelovar – Kroatio

Bjelovar, ĉefurbo de la Regiono Bjelovar kaj Bilogora, naskiĝis en la 18ª jc danke al dekreto de Imperiestrino Maria Theresia: onidire ĝi estas unu el la tri plej belaj kroataj urboj.

Ni celebros ĝuste en ĉi urbo la 20an Konferencon de ESPERANTO RONDO DE ALP-ADRIO, kies kunordiga centro estas nia TEA.

La celebrado estos vere impona: la 20ª Konferenco estas brila atingo por nia Rondo kaj indas ke la evento estu ne nur kun amasa partopreno sed ankaŭ ke ĝi fariĝu startpunkto por pli intensa kaj fruktodona agado en la teritorioj de Mezeŭropo. Ni klopodu pri vasta informado pri ĝi, instigu al partopreno, anonciĝu kiel eble plej frue, eĉ se kaj la programo kaj la bezonataj detaloj pri aliĝo kaj restado ankoraŭ ne disponeblas. Tamen ni certigas, ke ĉio estos rapide je dispono por perfekta aranĝo de via restado en Bjelovar, kiu povus esti ankaŭ kun unu-du pliaj tagoj.

# *Uno per tutti … cinque per mille!*

## AIUTACI AD AIUTARE L'ESPERANTO

*Il 5 per mille dell'IRPEF all'Associazione Esperantista Triestina*
*senza costi per voi!*

Anche quest'anno i contribuenti, grazie alle disposizioni inserite nella Legge Finanziaria 2006, possono destinare il **5 per mille dell'imposta stessa** a sostegno di determinate iniziative di rilevanza sociale.

## La nostra Associazione è fra gli enti che possono ricevere questo contributo.

Come fare ?
È molto semplice: basta indicare il numero di codice fiscale dell'Associazione nell'apposita casella prevista per la destinazione di questo contributo, nel momento in cui effettuerete la dichiarazione dei redditi per il 2017 (con il mod. Unico, il 730, il CUD, ecc). Il codice fiscale da indicare è il seguente:

**90012340320**

Invita perciò i tuoi amici, parenti, conoscenti, colleghi di lavoro, e tutte le persone che in qualche modo si dichiarano favorevoli all'esperanto, a scrivere nell'apposito spazio previsto nella dichiarazione dei redditi il

**numero di codice fiscale**
**dell'Associazione Esperantista Triestina**

Ringraziando per l'appoggio che ci potrai dare, porgiamo cordiali saluti.

ASSOCIAZIONE ESPERANTISTA TRIESTINA
Il Presidente
*(Edvige Ackermann)*

---

**Associazione Esperantista Triestina 90012340320**

**Associazione Esperantista Triestina 90012340320**
**Associazione Esperantista Triestina 90012340320**
**Associazione Esperantista Triestina 90012340320**
**Associazione Esperantista Triestina 90012340320**
**Associazione Esperantista Triestina 90012340320**
**Associazione Esperantista Triestina 90012340320**
**Associazione Esperantista Triestina 90012340320**
**Associazione Esperantista Triestina 90012340320**
**Associazione Esperantista Triestina 90012340320**